Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso:
Wien, I., Neue Burg,
Telefono R-27-803

Manuskriptoj
nur resendotaj kontraŭ reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono
komencebla ĉiumonate
por Aŭstria ŝ 4.60,
pagebla ankaŭ en part-pagoj (½ j. ŝ 2.35),
aliaj landoj svfr. 4.25
(9 poŝtrespondkuponoj)
Ponumere 45 g (1 prk).
Poŝtŝparkaso-konto
aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 12 (149) Korneuburg ĉe Wien, la 13. decembro 1937. 14. jaro

DREIMAL ÖSTERREICH!

Trifoje Aŭstrio!

La verko, ĵus aperinta el la plumo de federacia kanceliero d-ro Kurt von Schuschnigg, estas same majstre skribita kiaj estas la paroladoj de d-ro Schuschnigg.

Interesa estas la verko speciale pro tio, ĉar skribis ĝin la en tutmondo fama ŝtatestro de Aŭstrio, samtempe ankaŭ scienciisto, kiu pentris la unuopajn personojn kaj situaciojn, kiaj ili estis kaj kiel la verkinto ilin per siaj enpenetremaj kaj honestaj okuloj vidis kaj travivis.

La libro, kiu aperis en Viena Thomas-Verlag Jakob Hegner kaj ampleksas 335 paĝojn, en sia unua eldono, priparolita en la gazetaro en- kaj eksterlanda, post unu semajno estis elĉerpita.

Mi nun deziras ankaŭ doni al la samideanoj en la tuta mondo kelkajn ekstraktojn el la ege interesa libro.

„Trifoje Aŭstrio“ signifas la tri fazojn, kiujn la verkinto travivis. „La senco de ĉi tiu verko estas atesti por Aŭstrio; la neceseco de ĝia nuntempa aspekto, la plej profunda senco de ĝia estiĝo. Tio nur eblas laŭ historia vidpunkto. Kiu nur vidas la aferojn, kiaj ili estas nun, kaj ne scias aŭ jam forgesis, kial ili estiĝis tiel, kial — laŭ mia plej interna konvinko — ne povis veni aliel, tiu neniam vidos nian Aŭstrion ĝuste, neniam ĝin povos kompreni kaj juste prijuĝi. Sed la ĝusta kompreno de Aŭstrio, speciale flanke de la eksterlando, estas grava bezono de ĝia valido kaj situacio en la mondo. Veki ĉi tiun komprenon estas tial servo al la patrolando.“ La kanceliero daŭrigas en la enkonduko: „Kiu deziras kompreni la ideojn kaj pensmanieron de la aŭstriano nuntempa, kiu krome esploras la sencon kaj mesaĝon de la moderna Aŭstrio, devas ion scii pri la pasiona vojo de ĉi tiu prave ekzamenita lando, en sia specialeco unika, en siaj historiaj kaj kulturaj valoroj neanstataŭebla. Li devas scii, kio estis Aŭstrio tuj antaŭ la katastrofa disrompiĝo en 1918, li devas memori pri ĝia evoluo dum la unuaj unu kaj duonjardekoj post la milito, pri la ideoj kaj opinioj, kiuj tiam regis la ŝtaton kaj la popolon, ambaŭ pelataj de teorioj ĝis la ekstremo, kondukataj ĝis la rando de la abismo, ĝis kiam per superhomaj streĉoj kaj el la dorno-arbustaĵo de dolorplenaj oferoj sukcesis, veki novan vivon el la ruinoj.“

„...vidante la edifan kredon de la granda amaso de la veraj aŭstrianoj cedas ĉiuj krepuskaj ombroj de la dubo kaj de esperperdo... Certe ne estas facile, porti la respondecon en la nuna tempo kaj en ĉi

tiu lando. Sed la konvinko pri la ĝusteco kaj neceseco de la vojo, la pasia amo al la aŭstria penso, la kredo al ties nevenkebleco kaj nemortonteco, dum jarcentoj ĉiam denove pruvitaj kaj harditaj, estas pli fortaj ol ĉiuj ‚se‘ kaj ‚sed‘. Je la fino de ĉiu pripensado staras ĉiam denove, ĉiam pli unusignife, ĉiam pli nepre, ĉiam pli memkompreneble — malgraŭ ĉio — klara, rekta, germana, ĉiujn ventegojn kaj kontraŭaĵojn, ĉiujn cinikaĵojn kaj kalumniaĵojn venkanta, malcedema, fiera: Nun ĝuste tial por ĉiuj tempoj, ĉiam denove — trifoje Aŭstrio!“

Jen la tri epokoj de Aŭstrio: monarkio ĝis 1918, post la milito ĝis la reĝimŝanĝo en 1933 kaj depost tiam!

Ege interesa estas ĉi tiu libro kaj ni volonte prezentus al vi la tradukon de la tuta libro, por doni al vi agrablajn horojn kaj plenan komprenon pri Aŭstrio, ties gvidintoj kaj gvidanto, kaj pri la aŭstria popolo.

Nun sekvas kelkaj skizoj el la libro:

En la unua parto d-ro Schuschnigg priparolas la iaman monarkion kun ĝiaj malfacilaĵoj koncerne la lingvan problemon, la monarkion, en kiu vivis 16 nacioj, kiuj ĉiuj rajtis uzi sian lingvon. Li priskribas sian junaĝon, siajn studojn kaj kiel li poste kiel junulo tuj post fino de la mezlernejo faris ĉe Piave-rivero sian devon, defendi la patrujon, tiel amatan de li. Kaj en 1918 venis la renversiĝo, la revolucio. „Oni nomis la imperiestron kulpa. Li ne povis sin defendi — kaj la favoro de la popolo estas sanĝebla. Kaj tiel la portanto de la monarkia ideo kaj la monarkio mem estis la unuaj viktimoj. Neniu reganto suferis pli malbonan sorton ol imperiestro Karl, kiu venis en situacion, ne plu majstrebla laŭ homa prijuĝo. Li portis sian sorton kun indo kaj transpasis ĉi tiun ekzamenon kiel homo kaj Habsburg-ano kun ĉiuj honoroj. Ne ĉu li estis ĉiam bone prikonsilita, ĉu li ĉiam faris la ĝustan estas la demando. Sed ke li honestege kaj brave kiel tuta viro kaj vera aŭstriano volis la plej bonon kaj ankaŭ en la malfeliĉo agis multe pli honeste ol kelkiuj aliaj, tion konstati, signifas doni honoron al la vero, kiu bedaŭrinde tro longe ne estis donita,“

Seipel.

La kanceliero donas bildon pri la personeco de la mortinta kanceliero d-ro Ignaz Seipel, kiu estas nomata „envere granda aŭstriano“. Li pentris la personecon de Seipel: „Politikisto li estis, al kiu politiko estis la vivelemento, sed kies tasko estis en la plej alta senco de la vorto ‚zorgo pri la ŝtato kaj la popolo‘. Seipel estis la modelo de koncentracio, de la ordo en sia pensado, de disciplino kaj de klara politika celado do por longa antaŭvido.“

D-ro Anton Rintelen.

„Sendube“, diras la kanceliero, „la stiria landestro apartenis al la plej interesaj, rimarkindaj kaj viglaj personoj de la aŭstria

internpolitiko. En ĉiuj siaj eldiraĵoj Rintelen deklaris sin kiel severe kontraŭmarksista, sed sur la alia flanko estis klare videbla certe kontraŭeco al kanceliero Seipel. En la antaŭo de lia intereso — ankaŭ kiel instruministro — ĉiam okupis lin ekonompolitikaj aferoj. Al la tuta personeco de Rintelen certe estonta, pli trankvila tempo kapablos doni justecon. Ĝis ĉi tiu tempo multaj vundoj devos saniĝi kaj poste oni povos skizi ĉi tiun ĝis certa grado demonan karakteron.

Schober.

Kancelieron Schober (granda amiko kaj favoranto al Esperanto; rimarko de la red. de AE) d-ro Schuschnigg retenas en danka memoro. Li ŝatis Schober kiel homon kaj aŭstrianon. „Li estis modelo de aŭstria oficisto el la bona iama skolo. Al la politiko kaj al la politikistoj li envere neniam trovis intimajn rilatojn."

Princo Starhemberg.

D-ro Schuschnigg skribas, ke la iama landogvidanto de „Heimatschutz" E. R. Starhemberg, „kiu kiel unua je uzado de konsiderindaj personaj oferoj ebenigis la vojon al la ideo pri hejmland-ŝirmado en Aŭstrio. Se ankaŭ niaj vojoj disiĝis, mi kiel antaŭe vidas en princo Starhemberg ne nur la simpatian, en ĉiuj aferecaj kaj personaj aferoj ĉiam plej honeste pensantan kaj agantan viron, sed ankaŭ la aŭstrian patrioton, kiu en danĝera tempo, sen iam kaŝi sian germanecon, donis sian servon al la patrolando."

La martira kanceliero d-ro Dollfuß.

En aparta ĉapitro d-ro Schuschnigg metas monumenton de respektego kaj rekono al d-ro Dollfuß: „Simpla, modesta, natura, sen iu pretendo al la vivo, ege prudenta, kaj de nepra sincereco, kiu apartenis al la esenco de lia karaktero, societama kaj gaja, ĉiam movema, rapida, kelkfoje tro rapida en la decido, malamiko de ĉiu pozo kaj altruda teatraleco, sed tamen zorge atenta pri la respektado de la pozicio, en kiu li reprezentis la patrolandon, kuraĝa kaj sincere efikanta per sia personeco, kiu ne bezonis interspacon al sia ĉirkaŭantaro, por respektigi sian aŭtoritaton, al siaj kunlaborantoj kaj vojkunuloj fidela, ĉiam helpopreta amiko, ideala, kredema homo, fidela filo de la germana popolo kaj samtempe fanatikulo de sia ‚Kredo al Aŭstrio'. Tiel ni lin vidis."

Vere emocie efikas la unuafoje presitaj eldiroj de la policistoj, kiuj restis je la terura 25. julio 1934 ĉe la mortvundita d-ro Dollfuß ĝis lia lasta elspiro. Ripetfoje d-ro Dollfuß deziris paroli d-ron Schuschnigg, de kiu li deziris, ke li transprenu la formadon de la registaro. Se Schuschnigg ne plu vivus, tiam polica vicprezidanto Skubl transprenu ĉi tiun taskon. „Mi salutigas tre kore miajn edzinon kaj infanojn" estis la lastaj vortoj de la mortanta kanceliero.

La februarribelo 1934.

Pri tiu laŭ la libro, ne respondas la ŝtata gvidado. „Ĝi tiun ne instigis kaj entute ne deziris." D-ro Schuschnigg opinias, ke estas ekster ĉiu dubo, ke kunagado kun la socialdemokrata partio de tiam certe estus doninta al la naci-socialismo en Aŭstrio tiun sukceson, kiun ĝi per la julio-ribelo provis perforte havigi al si, sed kiu ne venis. „Kio depost julio 1936 okazas en Hispanujo", diras d-ro Schuschnigg, „estus estinta neevitebla por Aŭstrio. Por Dollfuß la februartagoj alportis la plej malĝojajn horojn en lia vivo."

La intertraktoj kun la nacisocialistoj

estas detale priparolataj en la libro. Interkonsente kun d-ro Dollfuß, Rintelen kaj Buresch havis priparoladojn kun la nacisocialistoj, en kiuj ankaŭ d-ro Schuschnigg partoprenis. Ili restis sensukcesaj, ĉar la nacisocialistoj postulis forigon de „Heimatschutz" el la registaro.

Renkonto kun ministro Hess.

D-ro Schuschnigg veturis Germanujon kaj havis interparoladon kun ministro Hess, por klarigi la ambaŭajn vidpunktojn eventuale prepari renkontiĝon de d-ro Dollfuß kun Hitler. Sukceson la interparolado ne maturigis.

Romaj protokoloj

estas detale klarigitaj en la libro. La kanceliero diras, ke Italujo neniam, nek en 1934 nek pli poste, eĉ nur faris la provon de enmiksiĝo en internaŭstriajn aferojn.

Julio-konvencio kun Germana Regno

enhavas, laŭ la libro, neniun vorton, kiun Dollfuß aŭ lia sekvinto en la ofico ne povus subskribi senpripense. La kanceliero ankaŭ kontraŭparolas la legendon, ke ekzistas iaj aliaj sekretaj interkonsentoj, kiuj devigas la aŭstrian registaron pli ol estas entenata en Juli-konvencioj.

La progresado en la repacigo

estas pruvita laŭ statistiko, laŭ kiu de 11. julio 1936 ĝis la jarfino 18.648 personoj, kiuj en la lastaj jaroj venis en konflikton kun la leĝoj pro kontraŭleĝa agado nacisocialista, estis amnestiitaj. La 1. oktobro 1937 estis en la internigejoj 45 personoj, en juĝeja aresto pro politikaj deliktoj 1207 kaj en polica aresto 900 personoj.

Legu la libron: ĝi donos al vi sciindajn informojn.

Steiner.

AL LA NASKIĜTAGO DE LA MAJSTRO EN „ORA JARO".



Nekonata bildo. Portret-tondaĵo de la gepatroj de nia Majstro. La teksto estas „La patro de mia kara Zamenhof kaj la patrino". La originalo estas posedaĵo de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, kiu ricetis la tondaĵon de mondmilit-partopreninto, kiu kunportis ĝin el Polujo. Aŭtor-rajtoj rezervitaj.

TUTMONDA ADRESARO DE LA ESPERANTISTOJ.

Jus, je la naskiĝtago de nia majstro okaze de la Ora Jubileo aperos la jam delonge bezonata kaj sopirata gvidilo por la samideanoj kaj propagandilo ĉe la oficialaj instancoj kaj ĉe dubemuloj **„Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj".**

Ĝi enhavas listojn de la internaciaj organizaĵoj, de 180 aperantaj gazetoj, informiloj, bultenoj ktp. kaj pli ol 5000 adresojn el pli ol 2500 lokoj en 106 landoj, inter ili pli ol 1500 grupojn.

La libro, 128 paĝa, en formato 15 je 23 cm, sur belega, senligna, luksa papero kun bela kovrilo, aranĝita de s-ano inĝ. Hugo Steiner jr., aperos sub la „Aŭspicioj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien", en la propra eldoejo de la verkinto, Bisamberg ĉe Wien, Bundesstraße 154. **Leteradreso:** Kort. kons. Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio.

La prezo estas aŭ ŝ 2.40 aŭ m afrankite. Enlandanoj pagu aŭ en poŝtmarkoj aŭ al poŝtŝparkasokonto [illegible] 123.826 „Aŭstria Esperantisto"; alilandanoj po 4 intern. poŝtrespondkuponoj.

Mi esperas, ke la samidearo ĝoje akceptos ĉi tiun libron, kies eldonkvanto estas limigita.

La verkinto: Steiner.

Vapor-fervojoj en Aŭstrio dum 100 jaroj.

La 23. de novembro estis 100 jaroj, depost kiam en Aŭstrio la unua vapor-lokomotivo tiris trajnon. Je tiu jubileo okazis grandaj festaranĝoj, kiujn ĉeestis la Federacia Prezidanto, kanceliero d-ro Schuschnigg, ministro por Komerco d-ro Taucher k. a.

La prezidanto de la Administra Komisiono de Aŭstriaj Ŝtat-fervojoj, la iama ministro por Komerco **Fritz Stockinger** diris en koncerna konferenco de la gazetaro: „... Ke s-ro la Federacia Prezidanto transprenis la protektoraton pri la jarcent-festo montras, ke ĉi tiu festo ne estas interna afero de la fervojoj, sed multsignifa por la tuta loĝantaro en nia ŝtato... Kiam la epoko de la maŝinoj frapis al la pordegoj de la iama monarkio, tiam ili tuj malfermiĝis al la ŝanĝitaj cirkonstancoj. La monarkio volis esti pioniro en la venkado de tempo kaj distancoj. La unua projektita linio estu de Wien al Bochnia, por interligi la koron de la regno kun ĝia plej norda teritorio. Ĉiu pluso je bezonoj, antaŭ ĉio vekita per la tekniko, aŭtomate fariĝas pluso por la kulturo. Al la granda evoluo de niaj fervojoj ni dankas ankaŭ, ke Aŭstrio ankaŭ en la 19. jc. povis forte teni sian mision disvastigi germanan kulturon trans la limojn... La reformo en la administrado, kiun la post la malfeliĉa milito tiel malgranda fariĝinta Aŭstrio trovis por sia fervoj-reto, deziras kontentigi la postulon de komerca laboro kaj la principojn de sociaj interesoj. Se oni pripensas, ke Federaciaj Fervojoj estis eltranĉitaj el la reto de la fervojoj de la iama monarkio, ke restis nur la multekostaj grandaj finstacioj kun mallongaj linioj, ke ili ne plu povis provizi sin kiel iam el la lando mem per karbo ktp., tiam oni rekonos la grandajn malfacilaĵojn. Plej granda ŝparemo, grandega kvanto da organiza laboro, sed unuavice la sperto kaj oferemo de la personaro kunagis, majstri la malfacilaĵojn.

La federaciaj fervojoj estas plenkonsciaj pri tio, ke ili ekzistas por la publiko kaj servi al la publiko estas ilia plej alta leĝo. Ili devas plialtigi sian laborkvanton, ili devas aranĝi la vojaĝadon malmultekoste, rapide kaj komforte. Ili deziras labori komerce kaj sociale kaj entreprenos ĉion, por kontentigi la rajtigitajn postulojn kaj dezirojn de la publiko, speciale koncerne la tarifojn. La Federaciaj Fervojoj estas proprajo de la tuta popolo kaj laŭ ĝia intereso ni devas agi. Kiel prezidanto de la Administra Komisiono mi deziras varbi por la fervojoj kaj akiri la plej gravan moralan kapitalon, nome la konfidon de la loĝantaro."

*

La 17. de novembro 1837, antaŭ 100 jaroj, la unuan fojon trajno veturis sur aŭstria teritorio, la unua vapor-fervojo, ĉar jam en 1825 funkciis fervojo (vagonaro ruliĝanta sur reloj), tirata de ĉevaloj, de Budweis al Linz, la unua tia sur la kontinento.

Prezidanto Fritz Stockinger, en Esperantujo ŝatata favoranto de Esperanto.

El la komparo de fervojo kaj vapor-fervojo rezultis fakte la elekto de la vorto „ĉevalpovo" por la laborkvanto de la vapormaŝinoj.

La enkonduko de la vapor-fervojo ĉie en la tiama epoko estis luktado kontraŭ teruraj kontraŭstaroj. Nur iomete pli da vagonoj transporti kaj iomete pli rapide veturi ol per ĉevaloj, estis la intenco. Kaj tamen la kreaj ideoj de la pioniroj estis rigardataj de iliaj samtempuloj kiel iluzioj de revuloj.

El Anglujo venis la ideo. Unue oni transportis karbojn en puŝĉaroj sur ferreloj, poste oni tie uzis veturilojn sur reloj ankaŭ por la transporto de varoj. En ĉi tiu tempo la vapor-maŝino estis inventita kaj plibonigata. Jam James Watt, la konstruinto de la unua taŭga vapor-maŝino, ekkaptis la ideon, funkciigi la fervojojn per vapormaŝinoj. 1803 estiĝis la unua vapor-lokomotivo. Ĉi tiu veturis sur ĉeval-fervojo en la nordo de Anglujo sur 16 km longa linio, kaj kapablis transporti ŝarĝon de 25 tunoj kun rapideco de 8 km po horo „montetojn supren-malsupren". La unua vera fervojo kun propra linio estis de Manchester al Liverpool 1830.

Sur la kontinento estis la unua Aŭstrio, kiu konstruis la ĉeval-fervojon de Budweis al Linz kaj jam en 1830 havis pretan projekton de 450 km longa vapor-fervojo de Wien ĝis Bochnia en Galacio, en 1831 la projekto estis kompletigita ĝis Brody ĉe la rusa limo kaj suden ĝis Triest. La aŭstria pioniro estis la profesoro en la Teknika Altlernejo Franz Xaver Riepl, la spirita kreinto de la aŭstria fervojaro.

Kaj la 17. de nov. 1837 veturis la unua trajno de Floridsdorf ĉe Wien al Deutsch-Wagram. Kvankam ĉi tiu proveturado estis aranĝita kaŝe, tamen sennombraj scivolemuloj venis por rigardi „la ege interesan spektakton de rapideganta karavano kun la rapideganta vaporveturilo sur la pinto". La „rapideganta vaporveturilo" estis kvarrada, al veturebla alfaltkaldrono ne malsimila lokomotivo, kiu kapablis veturi la 13 km longan linion kun du veturiloj po 3 kupeoj en la „spiroraba tempo" de 25 ĝis 30 km en la horo. Eĉ en Anglujo, kie la vapor-fervojo jam funkciis kelkajn jarojn, la fervojentreprenoj opiniis necese, admoni la pasaĝerojn ĉiam pri la „danĝeroj". La kuracistoj deklaris, ke la homo entute ne povas toleri veturrapidecon de 30 ĝis 40 km po horo, li devas sufok ĝi pro la aerpremo, la sango eliros el oreloj kaj nazo. La ĝenerala opinio estis, ke tiu, kiu veturas per la fervojo, estas stultulo kaj mortkandidato, li nur kunvenigu kuraciston; sed estas dube, ĉu li trovos kuraciston, kiu estus preta por tio. La Bavara Kolegio de Kuracistoj deklaris, la rapida transporto sekvigos ĉe la pasaĝeroj kaj ĉe eĉ la rigardantoj specialan cerbomalsanon „Delirium furiosum".

Sed malgraŭ tio la fervojo faris sian vojon triumfan tra la mondo!

(El „Aŭstrio en vorto kaj bildo") Steiner.

Internacia E-Ligo.

Por Tutmondo **interesa estos la nova Jarlibro 1938 de IEL,** kiu aperos en marto kaj enhavos ege interesajn artikolojn koncerne la E-movadon, necesajn por ĉiu esperantisto. Jam nun mendu ĝin per aliĝo **al IEL.** Steiner, estrarano de IEL.

Internacia Esperanto-Muzeo.

Nova Dumviva Membro:

Hugo J. Ceretti, inĝ. Radio-E., Rosario, Argentinio. Ni kore salutas nian novan membron.

Dumviva Membro povas fariĝi ĉiu, kiu pagas unufoje por ĉiam 17 svis. fr. aŭ egalvaloron. Du librojn, 4 fotojn kaj gvidilojn vi ricevos kun nia danko! Subtenu IEMW.

Novaj donacoj: Aleŝ Berka, Brno; Muuses E-Biblioteko, Pumerend; E-Asocio de Nord-Ameriko; A. D. Borisoglebsky, Michurinsk, USSR; Norvega E.-Ligo, Stabekk; IEL, Rickmansworth; Internacio de Milit-Kontraŭuloj, Enfield; Jaime Scolnik, Cordoba, Brazilio; Ludovic Rodo, Paris; Ediciones Argentinas, Buenos Aires; E. Ducommun, Les Brennets, Svis.; Joh. Wagner, Passing, Germ.; Rev. John H. Fazel, San Antonia, USA.; J. Gilliard, Annemasse, Francujo.

RADIO

Wien. La 14. de januaro flanke de E.-Varbadservo por Aŭstrio. Parolas Hugo **Steiner** pri „Viena Filmo", proksimume je la 22 h 20.

Verda Stacio: 21. 12. kaj 28. 12. Mor. Ostrava je 18 h „Libronovaĵoj" kaj d-ro E. Bayer, altlerneja prof., pri „Ĉu la vivo estas efektive batalo?"; 23. 12. je 22 h 35 ĝis 23 h Brno, Praha I, Mor. Ostrava „Kristnasko", popola balado; 4. jan. Mor. Ostrava 18 h, d-ro Šimek, prof. de Masaryk-univers. „Nederlandaj studentoj pri ni kaj ni pri ili"; 6. jan. Brno, Praha I, Mor. Ostrava de 22 h 20 ĝis 23 h 20 „Silvio Pellico", la arestito de Spielberg, radioludo.

Irlando: Athlone (531 m), Dublin (223 m) kaj Cork (242 m) disaŭdigas la 12. 12. je 19 h 50 pri du irlandaj sportoj „Ĉasado kaj fiŝkaptado".

Italujo. En **Napoli** la 17. okt. okazis la jara ĝeneralkunsido de Napola E-grupo, kies prez. prof. d-ro Koch faris la festparoladon pri la Ora Jubileo de E. d-ro Koch, reganto de la E.-Katedro, gvidas ankaŭ 2 kursojn en la lernejo „Angiulli" kaj ĉe la sidejo de la grupo en Hotelo Regina. Prof. Stellacci malfermis E-kurson sur la ŝipo „Conte Grande" por la ŝipanaro kaj por la vojaĝantoj. La E-propagando de prof. Stellacci estas tre grava kaj tre laŭdinda. (Orig. raporto.)

Aŭstr. Stato 1837 dec.

La registaro transpaŝas la ponton.

Orkestro de la ministoj el Kapfenberg, Stirio.

LABORFINFESTO

de Patriota Frontverko „Neues Leben“ (Nova Vivo) okaze de la inaŭguro de Reichsbrücke la 10. oktobro.

Granda laborfin-festo, gvidata de la ideo, montri la novan verkon al ĉiuj, kiuj pere aŭ senpere partoprenis en la konstruado de la nova ponto, estis aranĝita de „Neues Leben“. La laboristoj el Donawitz, la ministoj de Erzberg, la arbohakistoj, la karbominist oj, kaj ĉiuj, kiuj en la industrio kaj senpere en la konstruado estis aktivaj, partoprenis en nombro de 6000 personoj en la granda festprocesio.

Ĉi tiu procesio, kiu tuj post la solena inaŭguro de la ponto transpaŝis unue la ponton — ĉe la pinto la Federacia Prezidanto Wilhelm Miklas en la mezo kaj de md. Komercministro prof. d-ro Taucher, Ŝtatsekr. Zernatto, Kanceliero d-ro von Schuschnigg, Kardinalo ĉefepiskopo d-ro Theodor Innitzer, Financministro d-ro Neumayer, vicurbestro majoro Lahr — montris en formo de statistikoj kaj kuntransportitaj labormaŝinoj en tre instrua maniero la plenan konstruprocedon.

La duan parton de la laborfinfesto formis popolfesto sur Olympia-herbejo en Prater, kiu unuigis ĉiujn partoprenintojn.

Krome ĉiu en la konstrulaboro iel partopreninto ricevis de „Neues Leben“ dedi-ĉitan kruĉon kaj almanakon kiel memorajon je ĉi tiu festo de la laboro.

Laboristoj de la fandfornegoj en Donawitz.



Veturilo de ŝtal-uzino Böhler en Vordernberg.

Polico kaj Esperanto.

S-ro Dimov el Varna, Bulgarujo sendas al ni nacian gazeton el Sofia, kiu represis bildon, sur kiu la ĉinaj polic-oficiroj, kiuj lernis Esperanton en la polica lernejo en Wien, estas fotografitaj kun sia instruisto kortega kons. Steiner.

La Poŝto kaj Esperanto.

La trans-mar poŝtfako en Nov-Zelando trovis necese, posedi liston de la landnomoj en Esperanto, kiun havigis al ĝi N. Z. E. A. La kreskanta kvanto da korespondajoj, adresitaj en E., kaj la deziro forsendi korekte la poŝtajojn, instigis al ĉi tiu deziro.

La oficialaj informiloj de Ĝeneraldirekcio kaj de la unuopaj Landaj Direkcioj de la administracio por Poŝto, Telegrafo kaj Telefono enhavis sub la rubriko „Tre grave!“ informon, en kiu la partopreno en la E.-kursoj de Aŭstria E.-Asocio, la oficiala landa organizo de Aŭstrio, kaj en la skriba kurso de kortega kons. Steiner estas ege rekomendataj „konsiderante la grandajn avantaĝojn pro la kono de la helplingvo Esperanto en la rilatoj kun la klientoj, speciale en fremdulfrekventlokoj“.

Imitinde en aliaj landoj!

EL LA LEGANTARO

„...Via Radio-kurso instigis pasintsomere eĉ kelkajn subskribintojn partopreni ekskurson al via lando. Akceptu nian dankon pro via klopodo. **Rapla E.-Rondo**, Rapla, Estonujo.“

„...La promesitan Adresaron mi atendos kun interesego kaj eĉ sopiro. Ĝi estos netaksebla valora propagandilo. **Fred L. Wharff**, Los Angeles.“

„...kaj bondeziras sukcesegon en via entrepreno kaj kompreneble senpacience atendas la adresaron. **Ant. Kardauskas**, Vilkaviškis, Litovujo.“

D-ro Odo Bujwid 80-jarulo.

Tiu ĉi eminenta samideano, iama universitata profesoro kaj rektoro en la Jagelona Universitato en Kraków, Polujo, festis la 30. de novembro sian 80-an naskiĝtagon.



Li estis disciplo de Koch kaj Pasteur kaj internacie fama eminentulo sur la kampo de la bakteriologio.

Li studis kun Zamenhof en la Universitato kaj ludis, ludas kaj — ni ĉiuj deziras tion — ankoraŭ longan tempon ludos gravan rolon en la E-movado.

La 80-jarulo restu tiel vigla, kiel li nun estas, ankoraŭ dum longaj jaroj, tion deziras la esperantistaro kaj mi, kiu havas la honoron, esti nomata de Odo Bujwid „kara amiko“.

Steiner.

Pri libroj!

Nia redakcio proponis reduktitan vendoprezon al la samideanoj, kiuj jam en decembro pagos sian novan jarabonon. Tia rabato ne estas permesata kaj ankaŭ ne, ke mi peru tiujn librojn. Mi pro mia propono estis denuncita ĉe la koncerna oficiala instanco. Kompreneble ni ne sciis, ke tio ne estas permesata, alie ni ne estas proponinta tion al vi.

En nia 15a aperjaro ni donas al ĝustatempe paginta abonanto dufoje en 1938 senpagan anoncon po dulinian en la interŝanĝrubriko de nia gazeto kaj esperas, ke vi estos kontenta.

La eldonejo „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 28, je nia instigo malaltigis la vendoprezon de jenaj libroj:

XII-a Somera Universitato (anstataŭ S 2.70) nur S 1.80 plus 30 g afranko.

Antaŭaj Cirkonstancoj de Nestroy (anstataŭ 50 g) nur 30 g plus 10 g afranko.

En la sama eldonejo aperis „Germana ŝlosilo“ kaj„ Vortareto Germana-Esperanto“ haveblaj po 10 g.; „Per aŭtobuso tra Aŭstrio“, 80-paĝa belega gvidilo kun multaj bildoj; reduktita prezo (anstataŭ S 1.70) nur 1.20 plus 25 g afranko.

En eldonejo „Das Kleine Volksblatt“, Wien, VII., Bandgasse 28, aperis por kursoj kaj memstudado la lernolibro „Freude durch Esperanto“, prezo S 2.—.

La libroj estas haveblaj ĉe la koncernaj eldonejoj aŭ pere de la Esperanto-librejo, R. Foltanek, Wien, I., Herrengasse 2.

Al la legantoj de nia gazeto

sendas senpage **Ĉeĥoslovaka E-Informejo**, Praha XIX, Uralské 9: Ilustr. faldprospekton pri Ĉeĥoslovakio, Ilustr. faldprospekton pri festoj de la Ĉeĥoslovaka Gimnasta Asocio SOKOL en julio 1938 „X-a SOKOL-OLIMPIADO PRAHA 1938“.

KRISTNASKA AŬSTRIO

Subite la vintro venis en la montojn. Blanke kaj kristale vekiĝas la mondo, kiu hieraŭ ankoraŭ estis plena da aŭtuna melankolio kaj soleco. Em la valoj, super kiuj vespere brilegas la stelklara ĉielo de malmilda nokto, en la urboj, kies turoj kaj frontonoj fariĝas per la neĝoŝarĝo strangaj siluetoj en la vesperkrepusko, la el la domoj venanta varma lumo disrompiĝas en malgrandegaj lumpunktoj en la neĝkovrataj stratoj. La altarbaro knaras en la frosto, 'a abibranĉoj fleksiĝas sub la pezega ŝarĝo de blanka vintrobeleco, de la deklivoj de la montoj en Tirolo kaj Salzburgo frumatene migradas lumoj valen — kamparanoj iras al Di-servo. En la katedralo de Salzburg briletas kandeloj kaj la ĥoro okvoĉe per re-estiĝinta melodio el antaŭa tempo salutas la Adventon kaj Sankta Stefano rigardas sub sia neĝoĉapo ree mal-



Totes Gebirge (Oberösterreich), Kruco sur la pinto.

supren al lumanta, rapidanta, hejmeca Wien, en kiun jam venis la unuaj kristnaskoarboj — kristnaskiĝas en Aŭstrio.

Kiu vojaĝas tra la lando inter Bodensee kaj Danubo dum ĉi tiuj semajnoj, jam kelkajn horojn post eniro al aŭstria teritorio estas sorĉumata de la eterna, kortuŝa mistiko, la mirinde bela vintrosekreto, kiu dum ĉi tiu tempo ensorĉas urbon kaj kamparon. Kristnasko en Aŭstrio estas kiel neniu alia festo por la alpokamparano la festo profundinterna kredemo, kiu trovas sian metodan formiĝon en la konsekvenca restado ĉe la tradicia kutimaro kaj kulta esenco. Kiam dum „Rauhnacht" la neĝa ventego balaas tra la valo, skuas la trabaron kaj fajfas ĉirkaŭ la izolajn bienetojn, ke la brutaro en la staloj ekblekegante tiregas ĉe la ĉenoj, tiam la tempo por la vintrokoboldoj estas veninta. Prapatra kredo diras, ke demonoj kaj mok-fantomoj dum ĉi tiuj noktoj sin montras, ke senditoj el la infero faras petolaĵojn kun bienetoj kaj kamparanoj. Jen la junuloj eliras la vilaĝon por ekzorci la fantomojn kaj kelka petola maskoludo atestas la luktadon de la alpanoj kun la demonoj pro feliĉo kaj beno en la venonta rikoltjaro. La incensujo fumas. Torĉoj flamegas en la noktmalhelo kaj jetas akre vibrantan lumon tra la neĝkovrata valo. Diablo-figuroj, kiel demonoj vestitaj alpanoj, feinoj kaj diversaj estaĵoj (Perchten nomataj) aperas; praava kultaĵo festas en la valoj de Tirolo, Salzburgo kaj Karintio revivigon. En Oberösterreich (Supra Aŭstrio) je ĉi tiuj vesperoj la junulinoj sidas en la ŝpinejoj kaj la mastrino metis ĉarme odorantan kukon antaŭ la pordon. Ĉar sinjorino Borchta, kiu en sia esenco estas neniu alia ol la prapatra german-diino Frigga, la edzec-helpantino, la gardistino de la hejma fajrujo, iras kaj rigardas tra la fenestroj, ĉu la junaj knabinoj kaj junservistinoj estas sufiĉe diligentaj, por ke baldaŭ povu esti farata geedziĝfesto. En la alpovaloj de Aŭstrio oni trovas dum „Rauhnacht"-tempo tiel nenie en nia tiel senideala kaj aferec-fariĝinta Eŭropo la tutan romantikon de vigle fariĝintaj mitoj kaj legendoj kaj, se fremduloj travivas tian vesperon ĉe antikvaj popolkantoj, citro kaj orakol-sentencoj, ili adiaŭas sin el la mezo de ĉi tiuj kredemaj montinfanoj kiel unu el ili, al kiu ili venis en la sorĉo de la incensnokto.

En la halo de nobla hotelo en Kitzbühel en Tirolo la gastoj trovas iumatene ŝajne senatente disŝutitajn delikatajn pecetojn de orŝpinaĵo sur foteloj, tabloj kaj seĝoj. Ankaŭ ĉe la matemanĝotablo trovas Mister X. tian orfadenon kaj riproĉas al la kelnero. Sed la blonda sinjoro ĉefkelnero (nomata „Ober") ridetas: „Ho ne, Mr. X., tio ne estas malordo — tio ja estas peceto de anĝelharo! Kaj la krist-infano alportos al vi tre belaĵon!" Kaj la mirigita gasto el USA sciiĝas, ke dum la semajnoj ĉirkaŭ Kristnasko moro kaj kutimaro en Aŭstrio enpenetras ankaŭ la hotelojn ĝis la fremdaj gastoj. Infan-fabelo rakontas, ke dum ĉi tiuj semajnoj la Kristinfano flugas kun siaj akompanatoj tra la ĉambroj, por vidi, ĉu la homoj estas bonaj. Je tio la anĝeletoj kelkfoje perdas siajn orajn harojn kaj, kiu ilin trovas, en ties domon venas la feliĉo. Estas bona peco de la aŭstria Kristnaskmistero, ke la infaneca, sincera de tiu tempo ankoraŭ estas travivata de ĉiu en la mont-



Skiregiono ĉe Plannerhütte (kabano) en Wölzer-Tauern (montegaro) en Steiermark.

vilaĝoj, la urbetoj kaj eĉ en grandaj urboj kiel Graz, Wien kaj Innsbruck. Sur Kärntnerstraße en Wien dum la vesperkrepusko jam aperis transporteblaj vendejoj (nomataj „Standerl"), ĉe kiuj anĝelharoj, oraj nuksoj kaj neĝkovritaj abi-branĉetoj estas aĉeteblaj, sur la antikva placo „Am Hof" regas inter la hellumigataj budoj de la foiro vigla vivo. Kiel depost jardekoj „Am Hof" grandegaj kristnaskarboj lumas per centoj da lumoj kiel signo de la kristnaska Antikva Vieno kaj la skulpitaj Sanktuloj ĉe la preĝejo „al la naŭ ĥoroj de la anĝeloj" rigardas kun ŝtone ridetanta graco kaj benante levitaj manoj en la homamason. Sed la kristnaskofoiro, la vere Viena kristnask-dorado por granduloj kaj malgranduloj estas fore sur Neubaugürtel, kie la armeoj de la plumbosoldatoj marŝas, la koroj el mielkuko logas, la odoro de rostitaj maronoj kaj pomoj tiel ĉarme miksiĝas kun la bona aromo de abibranĉaro kaj miloj da infanokuloj kredeme admiras la gigantan kristnaskoviron kun felĉapo kaj barbo. Neĝkovrite Grinzing kaj Sievering montriĝas, helflava lanternlumo montras la

Kitzbühel (Tirol), ekzercteritorio kontraŭ Wilder Kaiser (montego).

Motor-ski-jöring en **Salzburg.**

Semmering (Niederösterr.), skisaltado sur Liechtensteinschanze.

antikvajn stratetojn en stranga kontraŭe de bluetaj ombroj kaj briletantaj neĝoebenaĵoj. La barokfiguroj sur la palacoj de Antikva Vieno surhavas blankajn neĝoĉapojn kaj la prujno elcizelis la ferforĝitajn kradojn de Belvedere kaj ĝiajn ornamentojn ankoraŭ per mirakla verko de blanka filigrano. En la katedralo de St. Stefano briletanta kandellumo heligas la multkolore pentritajn statuojn de la paŝtistoj, kiuj — ĉarmaj artverkoj el pasintaj jarcentoj — genuas preĝante ĉe la per brančaro enkadrigita kripo de la Di-filo. Potencaj sonoriloj sonoras super la lumanta, silentiĝinta mondurbo, kiu nun dum la horo de la Kristnaska noktdiservo sin dediĉas tute al la neforgesebla travivo de la Viena Kristnasko, kaj el la antikva Rupprechts-preĝejo, la plej antikva en la millionurbo, sonas la ĥoro en la vintronokton.

Samhore kamparanoj en festvestoj staras en profunda emocio apud urbanoj kaj fremduloj en la preĝejeto en Oberndorf en Salzburg, de kies ĥorejo nevidebla gitaro akompanas kvar kantvoĉojn, kiuj kantas la ĉi tie kreitan kristnaskokanton de la mondo: „Trankvila nokto, sankta nokto...“ Antaŭ la preĝej-pordo dormas en la malgranda monttombejo sub la blanka, mola neĝkovrilo en simpla ŝaktotombo la instruisto Franz Gruber, kiu antaŭ 119 jaroj la unuan fojon ludis ĉi tiun kanton sur la gitaro, kies akordoj jus perdiĝis.

Paca nokt'! Sankta nokt'!

Paca nokt'! Sankta nokt'!
Dia spir' en aer,
nur maldormas plej sankta la par',
ĉarma knabo kun bukla harar',
dormu dolĉe en paco,
dormu dolĉe en pac'!

El „Katolikaj Kantoj“ de L. Chiba, Wien, IV., Schaumburgergasse 4.

*

Kaj nun kora invito: Venu je kristnasko al Aŭstrio, festu kun ni la belan feston kaj ĝuu kelkajn tagojn de ripozo aŭ pro la vintrosporto en nia lando Aŭstrio.

Informojn donas **E.-Varbadservo** por **Aŭstrio,** Wien, Neue Burg.

Esperanto kiel scienca lingvo.

D-ro inĝ. **Eugen Wüster:** Konturoj de la lingvo-normigo en la tekniko.

Elgermanigis **D-ro Emil Pfeffer.**

Jen esperanta traduko gravega por la evoluo de nia scienca lingvo! Ĉar tia evoluo povas nur okazi, se oni uzas la lingvon en novaj ĝis nun ne ankoraŭ esperante pritraktitaj kampoj, tiel, ke oni estas devigata enkonduki la necesajn novajn fakesprimojn (terminojn). Tion faris la tradukinto per sia granda lingva kompetenteco en tre feliĉa maniero.

Pri la celo de la verko nur jenon:

Normigo (A. standardization, G. Normung, F. normalisation) signifis unue interkonsentitan unuecigon kaj plibonigon de unuoj. La plej granda sukceso tiurilate estis la enkonduko de la metra sistemo da unuoj por longo, areo, volumeno kaj pezo (maso) je la fino de la 18a jarcento. Pli poste oni normigis dimensiojn de teknikaj objektoj, ekz-e, reldistancojn, ŝraŭbrelojn k. t. p. „Post la milito tiel kreskis la ekkono pri la neceso de nacia lingvo-prilaboro, ke en preskaŭ ĉiuj landoj komenciĝas teknika lingvonormigo.“ „La pensinterŝanĝo jam delonge ne povas plu halti ĉe la landlimoj. ... La gepatra lingvo sola ne plu sufiĉas.“ Tio kaŭzis ĉe la teknikistoj ĉiam plifortiĝantan tendencon al la internacia lingvonormigo. Pri tio publikigis d-ro Wüster en 1931 gravegan germanan verkon „Internacia lingvonormigo en la tekniko“, kiu aperis 1935 ankaŭ ruse. En 1934 li verkis malgrandan eldonon de tiu libro, kiu ampleksas nur sesonon de la granda kaj estas intencita kiel unua enkonduko. Ĝia esperanta traduko estas la nun priparolata verko.

Ĉar ni esperas, ke baldaŭ aperos esperanta traduko de la kompleta verko ni prokrastas la priparolon de la enhavo ĝis tiu feliĉa okazo kaj priparolas la tradukon nur laŭ lingva vidpunkto, komparante kun la germana originalo por atentigi la vortaristojn pri la grava nova materialo. Kompleteon ni ne povas celi pro manko da spaco.

Laŭ la plano de la verko la novaj fakesprimoj apartenas ĉefe al tri regionoj: **lingvistiko, filozofio** kaj **tekniko.**

Lingvistiko.

lingvotereno — Sprachgebiet
cellingvo — Zwecksprache
konversacia lingvo — Umgangssprache
lingvozorgisto — Sprachpfleger
sistemdokumento — Systemurkunde
vortelemento — Teilwort
radiko — Stamm
praradiko — Wurzel
fleksia lingvo — biegende Sprache
aglutina lingvo — zusammenfügende Sprache
izolanta lingvo — abtrennende Sprache
enkorpiga lingvo — einverleibende Sprache
fleksiemo — Neigung zur Wortbiegung
derivilo — Ableiter
vortkunmetaĵo — Wortzusammensetzung
kopulacio — Aufpaarung
determino — Abmarkung
mutacio — Umordnung
devionomo — Abweichungsname
(vort)junto — Wortfuge
heredvorto — Erbwort
adaptita vorto — Lehnwort
fremdvorto — Fremdwort
latinismaj artefaritaj vortoj — lateinische Kunstwörter
mallongigita vorto — Kurzform
sonmallongigo — Lautkürzung
skribmallongigo — Schriftkürzung
fonetike kompletigita — lautgetreu ergänzt
lingva koplado — Sprachkopplung
aŭdokoplo — Hörkopplung
legokoplo — Lesekopplung
netsenceco — Scharfdeutigkeit
retroaktiva — rückwirkend
frazkapabla — satzfähig
signifo reto — Bedeutungssatz
transportnomoj — Übertragungsnamen
selekta etendosfero — Auswahlbereich
moligo de la radika vokalo — Umlaut
vokalo fleksita — Umlaut
voĉkorda obturo — Stimmbandverschluß
modifo de la radika vokalo — Ablaut
signifoscienco (semantiko) — Bedeutungslehre
vortkunŝovaĵo — Wortzusammenrückung
dividaj nomoj — Teilungsnamen

Tekniko.

objektonormo — Sachnormung
teknikaj artoj kaj sciencoj — Bauwesen
fervoja kajo — Bahnsteig
surgrua ĉaro — Laufkatze
subtilpoluri — feinschleifen
kejlo — Federkeil (Woodrufkeil)
diskokejlo — Scheibenfeder
alĝustigo — Passung
ŝraŭbrelo — Schraubengewinde
interĝustigaj tubopecoj — Rohrleitungsformstücke
transversa kaj laŭlonga pivotoj — Quer- und Längszapfen
turnostango — Treibstange, Pleuelstange
aerfendo — Luftspalt, Interferrikum
fasko da kampolinioj — Fluß
ŝarĝumo — Bürde
intenso cirkuito — Strompfad
instrumenta transformilo — Wandler
ŝajna rezisto — Scheinwiderstand
aga rezisto — Wirkwiderstand
malaga rezisto — Blindwiderstand

VIENA NOVA FILMARO

La publiko ne havas imagon pri la malfacilaĵoj, kiuj nun estas ligitaj al la gvidado de granda filmteatro kia estas la plej granda en Vieno, **Apollo.**

Nuntempe **Apollo-teatro** montras la **Ufa-filmon „Fanny Elssler“**, en decembro aliĝos du novaj Vienaj filmoj, nome **„Muziko por vi“** (Musik für Dich) kaj **„La karulo de la maristoj“** (Liebling der Matrosen).

„Fanny Elssler“ pritraktas parton el la vivo de danc-stelo, kiu estas plej intime ligita kun la arthistorio de Wien. Fanny Elssler estis danc-geniulo, kiu havis grandan signifon por la evoluo de la fama Viena baleda skolo. La artistino estas prezentata en la filmo de **Lilian Harvey,** kiu kiel neniu alia estas destinita por ĉi tiu rolo. Lilian Harvey estas bonega dancistino kaj havas en ĉi tiu filmo, kiu ĉerpas siajn efikojn ĉefe el la dancprezentadoj, riĉan okazon, montri sian dancarton. La filmo ne sekvas historiajn okazintaĵojn, sed permesas al la fantazio de la verkisto liberan vojon. Laŭ la filmo Fanny Elssler estas enamiĝinta en la duko de Reichstadt (L' Aiglon, la filo de Napoleono I.), prezentata de novtrovita artisto **Rolf Moebius.** Ankaŭ princo Metternich kaj lia ĉefa kunlaborinto barono Gentz ludas en la filmo grandan rolon, la lasta prezentita de **Willy Birgel,** la plej ŝatata karakterprezentanto de la germana filmo.

La dua Apollo-filmo estas kreaĵo de reĝisoro **E. W. Emo** kaj de la Viena komponisto **Robert Stolz.** Tio estas la unua provo de vera „porpopola filmo“. La Vienanoj Emo kaj Stolz en kunagado

Traŭdl Stark kaj Wolf Albach-Retty en „La karulo de la maristoj.“

Lilian Harvey kiel „Fanny Elssler.“

kun la aktoroj **Magda Schneider, Hans Söhnker, Paul Kemp, Fritz Imhoff, Julius Brandt, Franz Mayerhofer, Karl Skraup, Karl Hellmer** k. a. espereble sukcesigos la provon, popularigi la porpopolan filmon „Muziko por vi“.

La kristnasko-filmo de Apollo-teatro estas **Traŭdl-Stark-filmo „La karulo de la maristoj“.** La eksterordinara sukceso, kiun renkontis malgraŭ la mankoj de la temo la filmo „Petro en la neĝo“ instigis Apollo-teatron, jam montri je kristnasko la plej novan filmon kun la malgranda **Traŭdl Stark.** La kunagantoj de Traŭdl Stark estas **Woif Albach-Retty, Hertha Feiler, Lotte Lang, Richard Romanowsky** kaj ni pensas, sen deziri profeti, ke la nova temo en la filmo estas origina kaj estos la ĝusta programo por Kristnasko.

---

vatfluo — Wattstrom
senvata fluo — wattloser Strom
konektskemo — Schaltung
volvaĵo — Wicklung
glitkontaktilo — Gleitkontakt
prensekura — griffsicher
barbobeno — Drosselspule
kromgeneratoro — Zusatzgenerator

Filozofio.

kozo — Sache, Ding
(ĉiu aĵo, eco aŭ ado, unuvorte ĉiu o-vorto)
nocio — Begriff *)
nociamplekso — Begriffsumfang
nocienhavo — Begriffsinhalt
subampleksa nocio — Oberbegriff
superampleksa nocio — Unterbegriff
nociformo — Begriffsform
nocitransporto — Begriffsübertragung
difino — Begriffsbestimmung
subordita termo — Unterglied

*) Vidu: Kamaryt, Filozofia, Vortaro. (Eld. Moraviaj Esperanto Pioniroj, Olomouc.)

mezurilo de l' pritakso — Wertungsmaßstab
fakultativa precizeco — wahlfreie Genauigkeit
neta signifo — scharfe Bedeutung
delimado — Abgrenzung
senco signo — Sinnzeichen
kozo signo — Dingzeichen
senchava — sinnhaft
interrespondi — entsprechen
respondigo — Zuordnung

Diversaĵoj.

en strikta senco — in engerem Sinne
mezmezure — durchschnittlich
kunrigardebla — übersichtlich
tendenco — Ansatz
poŝtalvenaĵo — Eingang
engrefti — einfügen

D-ro H. Sirk.

Pardonu la malfruiĝon de AE, kaŭzita de la laboroj por „Tutmonda Adresaro“.

KARAJ LEGANTOJ!

Post kelkaj tagoj ni festos Kristnasken kaj mi petas, ke vi akceptu miajn plej sincerajn bondezirojn al ĉi tiu festo kaj ankaŭ por Novjaro! Je tiu okazo mi kore dankas pro via fideleco kaj petas, ke vi ĉi tiun daŭrigu ankaŭ en la nova jaro, la **15-a depost kreo de nia organo.** Je tiu okazo malgrandan donacon mi prezentas al vi! **Ĉiu paginta abonanto** povas senpage **dufoje** en 1938 presigi po **2-linian** anoncon. Mi promesas ankaŭ en la venonta jaro **plibeligi** kaj **pli-interesigi** nian gazeton kaj en daŭrigoj publikigos **belan romanon kaj novelon.** Samtempe ni **regule raportas** pri **Viena Filmo.** Kun plezuro ni publikigos ankaŭ **artikolojn,** kiujn **vi sendos** al mi. Ni ĉiun numeron provizos kun multaj bildoj kaj interesa teksto, sed **ne malatentante la raportojn pri nia movado tutmonda.**

Do belan feston, feliĉigan novjaron kaj fidelan kunlaboron en 1938.

Steiner.

30-a Universala Kongreso de Esperanto.

30. julio ĝis 6. aŭg. 1938.

Kongres-oficejo: Internacia E-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

Protektorato. La Altan Protektoraton transprenis Lia Reĝa Moŝto Duko de Konnaught, kiu jam ĉe antaŭaj kongresoj estis protektoro.

Kotizo: Ĝis fino de 1937 aŭ ŝ 26.—, por la edzino kaj junuloj ne pli ol 20-jaraj 13.—; ĝis 31. 3. 1938: 33.— resp. 16.50.

Aliĝis ĝis nun 300 personoj.

La kongresejo estos la Universitato en London.

Belaj kongresafiŝoj, montrante la Parlamentejon, estas haveblaj kontraŭ 1 respondkupono.

Oesterreichisches Verkehrsbüro kalkulis la vojaĝon al la kongreso jene:

a) veturado **Wien**—Passau—Frankfurt (nokto, matenmanĝo)—Brüssel (n kaj mm)—**London** (7 n kaj 7 mm)—Paris (3 n kaj 3 mm)—Basel—**Wien.** La veturprezo kun noktigoj kaj matemanĝoj, inkl. 10% trinkmono en II. klaso 438.—, en III-a 338 aŭ ŝ.

b) **Wien**—Frankfurt (n kaj mm)—Brüssel (n kaj mm) — London (7 n kaj 7 mm)—**Wien** aŭ ŝ 372.— en II-a kaj 284.— en III-a klaso.

Skribu (speciale eksterlandanoj) senpere al Oesterreichisches Verkehrsbüro, Wien, I., Friedrichstraße 7 en Esp.

Aliĝu multnombre al la Kongreso!

40 jarojn Deutschösterreichische Schriftstellergenossenschaft.

Ĉi tiu fama asocio de verkistoj aŭstriaj festis la 17. de nov. la feston de sia 40-jara ekzistado, kiun ĉeestis la Federacia Prezidanto, instruministro d-ro Pernter, la ŝtatsekretarioj d-ro Skubl kaj Zernatto, urbestro Schmitz kaj multaj aliaj eminentuloj.

Prez. prof. d-ro Hans Nüchtern, direktoro de la literatura fako ĉe Radio-Wien, faris la festparoladon, memoris pri la mortintoj kaj dankis al la kunlaborantaj vicprezidantoj kaj la ĝeneralsekretario reg. kons. Viktor Patera kaj finis per parolado pri **„La fizionomio de Aŭstrio en la poezio“**: Poezio estas rebrilo de la eterna forto, kiun Dio metis en homajn animojn, parto de la tuto de la arto kaj de la kreaĵo. La fido al la miraklo en ni, je tero kaj heredaĵo, estas por ni konfeso kaj revo kaj ricevita de ni kiel heredaĵo. Ĝin transdoni plue al pli hela estonteco, kiun ni sopiras, kiun ni esperas por niaj lando kaj popolo, por la junuloj post ni, estu en tiu solena horo voto kaj konfeso.

Sekvis parolado de **instruministro d-ro Pernter,** kiu gratulis kaj diris, ke ĉi tiu jubileo estas grava okazintaĵo en la kulturhistorio de Aŭstrio, „la genieco ne toleras mutigon, ĝi ĉiam denove sukcese elvenas“. Poste la ministro transdonis al prez. d-ro Nüchtern kun gratulvortoj la altrangan ordenon „Meritkruco unuaklasa por arto kaj scienco“.

La ĝeneralsekretario de Patriota Fronto **ŝtatsekretario Zernatto** gratulis kaj diris, ke „Patriota Fronto estas sur la vidpunkto, ke la politiko ne rajtas ordoni al la scienco kaj ke ne estas tasko de la politiko, doni direktivojn al la arto. Politiko kaj arto estas esencdiversaj aĵoj“.

Post parolado de **vicurbestro Lahr** finis la bela solenaĵo.

Steiner.

Friedrich Schreyvogel:

El Brigitte kajan la ĝelo.

Kun permeso de Zsolnay-Verlag, Wien.

Kiam ili enveturis en Salzburg, jam vesperiĝis. Kastelo Hohensalzburg reliefiĝis kiel revobildo en la vespera ĉielo.

„Ni tute ne rapidos.“ Christoph tiris la biletarojn el la poŝo, en kiu ĉiuj bonoj por la hotelo estis engluitaj. Ankaŭ por la veturado de la stacidomo al la hotelo. „Silberne Traube“ („Arĝenta Traŭbo“) sendis je ĉiu rapidtrajno sian veturilon al la stacidomo, kiu devis atendi, ĝis la lastaj vojaĝantoj estis forlasintaj la stacidomon. Oni do ne havis avantaĝon, se oni sin premis al la elirejo.

La ŝofero de la hotelveturilo jam estis informita. Depost hodiaŭ matene la ĉefo, metia konsilisto Tittlinger, per letero de Hitzmannseder estis informita, ke li ne nur atendu du plenkreskajn gajnintojn de la lotumo, sed ankaŭ ilian infanon. Jam estis zorgite por tio, ke Brigitte havos sian komforton. Tittlinger estis destininta por la paro la plej grandan ĉambron en la dua etaĝo kaj stariginta en la angulo trian malgrandan liton.

La kofroj baldaŭ estis ŝarĝitaj sur la veturiltegmento, oni nur devis ankoraŭ levi la malgrandan knabinon en la veturilon.

Brigitte staris familiare, kvazaŭ ŝi estus vidinta lin jam ofte, apud Georg, kiu estis ŝin atendinta kun la veturilo. Georg ankoraŭ ne surhavis la jakon kun la galonoj, kiu estis destinita por lia deĵoro. Li ankoraŭ iris en la blua vestaĵo, kiun oni estis doninta al li el lia vilaĝo por la dimanĉo en la urbo. Ĝi estis malmultekosta vestaĵo, sed ĝi tamen faris sian devon, kiom longe li estis servinta en Traŭbe kiel gasto. Depost tri tagoj li kunveturis, kvankam lia libertempo ankoraŭ daŭris, ĉiam al la stacidomo. La ĉefo rigardis tion kiel fervoron kaj ĉiuj aliaj en la hotelo lasis al li ĉi tiun ĝojon. Georg havis sian specialan motivon por tio: antaŭ la stacidomo li povis vidi homojn, kiom li volis. Al tio pelis lin la anĝelo, kiu ankoraŭ ĉiam estis avida je homoj. Ha, miloj ne estus povintaj kontentigi ĉi tiun avidon.

Kiajn viglajn okulojn la malgranda knabino havis! Georg prenis ŝian manon, kiun ŝi gaje prezentis al li. „Ĉu ci longe restos ĉe ni?“ li demandis. „Dek tagojn“, diris Brigitte. „Kaj ĉu ci ankaŭ estas en la hotelo?“ Georg retenis la malgrandan manon. „Ci nur bezonos sonorigi, se ci ion deziras. Tiam mi venos kaj kunportos por ci ĉion, kion ci volos havi.“ De nun li volis, ankaŭ se li ankoraŭ ne estis en la servo, ĉiam sidi en la pordista loĝio kaj atenti, ĉu ne el la ĉambro, en kiu la malgranda knabino loĝis, estis sonorata pro la servisto.

„Brigitte!“ vokis Elisabeth. La infano alie estis timema. Kun kiu ŝi ĉikaze tiel rapide amiĝis?

„Ĉi tiu estas nia servisto!“ klarigis la ŝofero. „Li tre amas infanojn kaj li tre gardos la malgrandan fraŭlinon.“

Estis dolĉe rigardi, kiel la malgranda knabino en sia griza mantelo scivole staris apud la bubo, kaj kiel Georg tenis la blankan manon tiel sindone, kvazaŭ li timus ĝin rompi.

Fine Brigitte lasis sin levi en la veturilon. „Nun ci ja tuj havas amikon“, diris Christoph kaj sidigis ŝin inter ŝi kaj Elisabeth sur la sidbenkon.

Brigitte kapjesis fervore. „Jes li estas tre aminda!“

Venis hodiaŭ neniuj gastoj krom ili en „Silberne Traube“ kaj la veturilo ekveturis. Georg ne sidigis sin apud la ŝoferon, li saltis sur la piedtabulon. Tiel la veturado faris al li pli multan plezuron. Kiel ofte Brigitte lin alrigardis, li brile kapjesis al ŝi. Tiam li forgesis tiri al si la kruddrapan mantelon, kiu lin varmigis dum la veturado, kaj la vento ŝveligis la surtuton ambaŭflanke. Oni povis pensi, ke li surhavas eĉ neniun mantelon super la blua vestaĵo, sed du malhelajn flugilojn.

Trad. Hugo Steiner.

Esperanto instruata sur itala grandŝipo.

En la plano de instruado de eksterlandaj lingvoj la estraro de „Dopolavoro Marittimo“ (mara postlaboro) de „Conte Grande“, la plej granda pasaĝerŝipo itala je la linio Italujo—Sudameriko, decidis enigi ankaŭ Esperanton.

Tiun ĉi kurson gvidos s-ano prof. Agostino Stellacci, kapelano de la sama ŝipo, Napoli, Vicoletto Trinità Spagnoli 3. Li fervore propagandas nian movadon kaj faras dum ĉiu vojaĝo paroladon pri Esperanto por la pasaĝeroj kaj la ŝipanaro kaj gvidos de nun ĉiam kurson.

(Originala raporta.)

RECENZOJ

D-ro inĝ. **Eugen Wüster:** Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko. El la germana originalo esperantigis **D-ro Emil Pfeffer.** 123 pĝ., 14 × 20 cm. Eld. Literatura Mondo. Budapest 1936. Dua libro de la AELA serio en 1935. Vidu la artikolon „Esperanto kiel scienca lingvo“ sur paĝo 6. Preza 0.60 dolaro.

Kolekto de Franca E-Instituto.

N-ro 21. **„Polusaj Glacioj sub noktomeza suno“** de Joel Thézard. 48 paĝa, prezo 7 fr. fr. kun 30 laŭnaturaj bildoj, desegnoj ktp. de la aŭtoro mem.

La libreto priskribas krozadon al Islando kaj Spitzbergo kaj reveturon laŭlonge de la norvegaj fjordoj.

NOVA GAZETO.

„Per unuigitaj fortoj“, ĝenerala revuo de la E-movado. En nov. aperis la unua numero 16 paĝa, eld. de **M. Movo,** Paris-Vanves, rue Jullien 84, Francujo. Jarabono 35 fr. fr., por Aŭstrio 7 ŝ. Mendu specimenon de la tre interesa gazeto.

Rosario, Argentinio. Hugo J. Ceretti, 9 de Julio 3301, direkt. de „Internacia“, redakt. de „Lengva International“, dez. koresp. k. tutmondo, ĉiam resp.

La klišoj de „Heimatdienst“.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 54. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 28

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist“

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des **Oesterreichischen Esperanto-Bundes** und der **I. E. L.-Jugend**

Nr. 12 (27) 13. Dezember 1937

Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-123.826

AUS ALLER WELT.

Die Gegner des Esperanto behaupten, daß Esperanto niemals siegen wird. Dasselbe haben die Rückschrittler von allen großen Erfindungen behauptet, z. B. von der Eisenbahn, Luftschiffahrt. Diese letzteren haben die Welt erobert. Auch die internationale Hilfssprache wird sie erobern. Den törichten Behauptungen der Rückschrittler stellen wir ein festes „und wir werden dennoch siegen!“ entgegen.

Japanische Wissenschaftler benützen Esperanto.

In Japan hat sich eine Vereinigung von esperantosprechenden Wissenschaftlern gebildet, die bereits 450 Personen umfaßt.

Esperanto in englischen Schulen.

Im Mai 1937 wurde Esperanto in 29 Schulen Englands unterrichtet und 1193 Schüler nahmen daran teil. In diese Statistik ist Wales und Irland nicht aufgenommen.

Esperanto und die Medizin.

In der Pariser Fachzeitschrift „La gazette des hôpitaux“ erschien ein langer Artikel, der auch in einem Separatdruck zu haben ist und den Titel führt „Welche Dienste wird Esperanto der Medizin und den Medizinern leisten?“

Post und Esperanto.

In den Amtsblättern der Generaldirektion und der einzelnen Direktionen der Post- und Telegraphenverwaltung Oesterreichs wurde die Teilnahme der Bediensteten an den Esperanto-Kursen des Oesterr. Esperanto-Bundes und an dem von Hofrat Steiner geleiteten schriftlichem Kurse „in Anbetracht der großen Vorteile der Kenntnis der Esperanto-Hilfssprache beim Parteienverkehre, insbesondere in den Fremdenverkehrsorten“ besonders empfohlen. — Dieses Beispiel wird in manchen Ländern Nachahmung finden!

(Für Gruppenabende.)

Wien, die Stadt meiner Träume.

(Rud. Sieczynski.)

Wien, la urbo de mia songĝ'!

(Trad: Fritz Stengel.)

La kor' kaj la sent'adoras nur Wien,
Nur Wien en la gaj' kaj malgaj'
Ho, Wien konas mi, en Wien hejmas mi
Dumtage kaj pli dum la nokt'
Wien amas junul' kaj eĉ maljunul'
Se li konas Wien, mian Wien.
Se mi estus for el la bela lok',
Sopirus je ĝi mi sen fin',
Mi aŭdus la kanton el malproksim',
kiu sonas kaj kantas, kaj logas al Wien:

Wien, Wien, nur ĉiam vi
Estu la urbo de l' songĝ' al mi!
Staras ankoraŭ malnovaj dom' domet',
Ridas belegaj virin', inet'.
Wien, Wien, nur ĉiam vi
Estu la urbo de l' songĝ', al mi,
Ege ĝi igas feliĉa min,
Nur Wien, nur Wien, nur Wien!

Ĉe bona amuza', ĉe bona plezur'
Ho, tuij ĉeestas ja mi,
Se bona humor' enestas en kor'
Jen ĉio ne gravas por mi.
Kaj tiam ĉe vin 'ni renkontas nin,
Sopire brakumas ŝi min,
Se sonas sen paŭzo la valso de Strauss,
Pro laŭdo por mia urb' Wien,
Mi aŭdas la kanton el malproksim',
Kiu sonas kaj kantas kaj logas al Wien.

Neu-Seeland, Australien. Die stets wachsende Zahl der Esperanto-Korrespondenz von und nach Neu-Seeland hat das Uebersee-Büro des Hauptpostamtes in Wellington veranlaßt, von der Neu-Seeländer Esperanto-Landesorganisation eine Liste der Landesnamen zu verlangen.

I. Komplemento kaj direkto.

La rekta akuzativo estas uzebla en ĉiu frazo nur por unu celo: aŭ la objekta celo aŭ la persona celo aŭ la direkto de la ago. Se unu frazo enhavas k e l k a j n celojn (gramatike diversspecajn), tiam nur unu el ili estas esprimebla per akuzativo, la aliajn oni devas esprimi per prepozicioj

E k z e m p l o j:

		Ago:	Objekto:	Persono:
Nur objekto:		Mi skribas	leteron	—
Objekto k. persono:		Mi skribas	leteron	al mia amiko.
Nur persono:		Mi skribas	—	al mia amiko.
		Mi dankas	—	vin.
Objekto k. persono:		Mi dankas	tiun leteron	al vi.
	aŭ:	Mi dankas	pro tiu letero	vin.
Direkto:	a)	Mi veturas	—	al Berlino =
	=	Mi veturas	—	Berlinon.
	b)	Mi sendas	leteron	al Berlino.
		Mi sendas	leteron	en la urbon.
	c)	Mi sendas	leteron	al amiko en Berlino.

II. Adverba akuzativo kaj pluraj akuzativoj.

Sendependaj de la komplementaj kaj direktaj akuzativoj estas la adverbaj akuzativoj: ekz. la tutan tagon, la 3an de Januaro, venu dimanĉon, muro alta 3 metrojn k. t. p.

Se en frazo krom tia adverba akuzativo troviĝas komplementa akuzativo, oni evitu ilin meti unu apud la alian.

Ekzemploj: malbonaj:	bonaj:
Vizitu min dimanĉon!	Vizitu min dimanĉe!
La artisto ĵonglis ŝtonon pezan (unu) funton.	La artisto ĵonglis ŝtonon, kiu pezis unu funton.
Mi vidis katon manĝantan muson.	Mi vidis katon, kiu manĝis (aŭ: estis manĝanta) muson.

E. Werner.

„Oesterreich in Wort und Bild“, eine vornehme Revue, herausgegeben vom Heimatdienst, Wien, I., Dorotheergasse 9. Einzelnummer 30 g, Jahresbezug S 3.—.

„Reichspost“ (31. 10.): „Der Eucharistische Kongreß und Esperanto“.

„Das Kleine Volksblatt“: Regelmäßige Esperanto-Ecke jeden Sonntag.

„Wiener Neueste Nachrichten“, Wien, 15. Juli 1937, berichten unter dem Titel „Starker Rückgang des Museenbesuches“, daß eine rühmliche Ausnahme bilden: Niederösterr. Landesmuseum, Historisches Museum, Römisches Museum und Esperanto-Museum (197 Besucher im Jahre 1930, 1306 in 1935).

„Die Stunde“ brachte am 29. Oktober einen Artikel über die Jubiläums-Esperanto-Briefmarken Brasiliens nebst Abbildung derselben.

Lehrerblatt des Kath. Landes-Lehrer-Vereines f. d. Bdland Salzburg bringt in seiner Folge 8, 9, Oktober, einen schönen Artikel: „50 Jahre Esperanto“, von Fachlehrer Fötinger und die Nachricht, daß in den Fortbildungskursen der Junglehrer Esperanto von L. Fötinger gelehrt wird.

Offizielle Nachrichten der Wiener Gast- und Schankgenossenzunft: „Erstes Esperanto-Weltadreßbuch“.

Internacia Esperanto-Ligo
ĉefdel. G. Weber, Wien, I., Neue Burg.

(Poŝtŝpark. n-ro B 178.935.

DUMVIVA MEMBRO: S-ano Heinrich Peter, inĝ., Wien, fariĝis la unua D. M. en Aŭstrio.

Por 1938 validas jenaj **rabatitaj** jarkotizoj: 1) **MJ** (membro k. jarlibro) ŝ 4; 2) **MA** (m. k. jarl. kaj monata „Esperanto

Internacia") ŝ 10; 3) **MAH** (m. k. jarl. kaj semajna „Heroldo de Esperanto") ŝ 24; 4) **MS** (m-subtenanta), (kiel MA plus libro-premio) ŝ 35; (por poŝtŝparkasaj elspezoj aldonu al 1) 10 g, al 2—4) po 15 g!); 5) **Patrono** (kiel 4) ŝ 130 kaj 6) **DM** ŝ 260 **unufoje por ĉiam!**

Aliĝu, neniu esperantisto **manku** en la **vicoj de IEL,** la **granda neŭtrala E-organizo tutmonda!**

Oficialaj informoj de
Aŭstria Esperanto-Asocio
reg. kons. Fritz Stengel, prez.
Wien, XVII., Syringgasse 3.

Kristnasko-Novjaro.

Okaze de la kristnaskaj festtagoj kaj de novjaro la estraro de AEA deziras al ĉiuj grupoj kaj izolaj membroj multan feliĉon kaj al la Esperantomovado en Aŭstrio kaj en tutmondo novan progreson. Ni ŝatus ricevi raportojn pri bonsukcesintaj Jubileaj, Zamenhofaj kaj kristnaskofestoj kaj volonte publikigos ilin.

Gazetservo.

La gazetservo de AEA dissendis per „Amtliche Nachrichtenstelle" jenajn artikoletojn: La nombro de la Esp. instruistoj; La Eŭkaristia kongreso kaj Esperanto! Novaj brazilaj Esperantopoŝtmarkoj; Ĉeĥoslovakaj Radiostacioj dissendas Esperantooperon. Bonvolu kolekti gazeteltranĉajojn.

Firmo uzas Esperanton.

Ni informiĝis, ke la mondkonata fotofirmo „Gevaert" aldonas al ĝiaj fotopaperoj ankaŭ esperantolingvan uzadklarigon. Ni subtenu tiajn firmojn per aĉeto de iliaj varoj montrante ekzemplon de esperantista konscienco kaj disiplino!

Distingo

La grupoj, kiuj povas proponi samideanon aŭ samideaninon longjoran kun **specialaj** meritoj en la aŭstria Esperantomovado, tion bonvole komuniku al AEA pro eventuala distingo per la arĝenta honor-pinglo. Ne nur estu konsideratai nun aktivaj esperantistoj sed ankaŭ tiuj, kiuj iam helpis kaj kontribuis al nuna stato kaj progreso.

Esperantofesto.

En la kadro de R. K. (AEA kaj AEF) okazos la 18-aŭ de Dezembro je la 7.30 la solena Jubilea festo de la Viena esperantistaro. Ni invitas ĉiujn esperantistojn partopreni la feston. Biletoj estas haveblaj en via E.-grupo kaj ĉe la estraro de AEA, merkrede post la 19 en Lehrerhaus (Langegasse-Josefsgasse).

Esperantosapo.

Ni informas, ke granda sapofabriko eldonas „Esperantosapon". La sapo estas havebla en Vieno en jenaj vendejoj: Reiner, I., Parkring 12; Kaufmann, II., Praterstraße 42; Nugent, VI., Mariahilferstraße 1a; Heisler, XII., Arndtstraße 2; Lustig, XIV., Schwendergasse 39; Koch, XVII., Palffygasse 2; kostas S —.90 por 3 pecoj, S 1.80 por 6 pakitaj, S 2.— por skatolo kun 6 p. AEA transprenis kvanton por la grupoj kaj izolaj membroj kaj invitas al aĉeto. **Taŭga kristnasko-donaco,** bona propagando por Esperanto.

Al ĉiuj esperantistoj en Aŭstrio!

Jam depost 17 jaroj **„Heroldo de Esperanto"** estas la bone funkcianta, regule aperanta, vere universala **semajna** organo de la Esperantomovado. Por sennombraj esperantistoj Heroldo estas la plej grava kuraĝigilo, ĉiam servanta al la Esperantomovado, interliganta per sia regula semajna apero la esperantistojn en la tuta mondo kaj komunikanta **ĉiusemajne** la **novajojn** el **tuta** Esperantujo, precipe kiel oficiala organo de Internacia Esperanto-Ligo.

Havinte en 1933 la eblecon forlasi la Esperantomovadon kaj daŭrigi la ekzistadon en Germanujo kiel neesperantista entrepreno Heroldo rifuzis tion, riskis la malpermeson de plua apero kaj iris en ekzilon.

Ne estas nur modesta signo de danko, sed vera spirita profito de **ĉiu** unuopa esperantisto, se li **regule legas** tiun ĉi gazeton.

Aŭstria Esperanto-Asocio do alvokas ĉiujn esperantistojn en Aŭstrio, kiuj iel havas la eblecon, elspezi ĉiusemajne kelkdek groŝojn, aboni Heroldon. Krome **ĉiu grupo** por la aliaj membroj **abonu** ekzempleron, por ke **ĉiu** esperantisto havu la eblecon, **legi** la semajnan organon de la Esperantomovado.

Ni ĝojas povi raporti pri **favorprezo** por nia membraro: Se la abonemuloj interkonsentas, ke **almenaŭ 4 ekzempleroj** de „Heroldo de Esperanto" estos sendataj **al unu adreso** kaj la abonprezo estos pagata al la ĉekkonto de AEA, sesmonata abono de Heroldo kostos nur **eĉ S 7.70.**

Unupuloj pagas S 8.70. La estraro de AEA esperas, ke tiu granda rabato estos forta instigilo al multenombra abono kaj petas la grupojn, tuj fari la necesajn paŝojn kaj informi nin pri la rezulto. Ni laŭde mencios la ekzemplodonajn grupojn.

Es ist **Ehrenpflicht** eines **jeden** AEA-Mitgliedes, für **„Aŭstria Esperantisto“** und für **„Die zweite Sprache“** aufs eifrigste zu werben.

Die Leitung der AEA.

Graz. La 11. dec. plenkunveno de E.-Soc. por Stirio en sia klubejo, Bürgergasse 4.

Salzburg. E-grupo havos la 11. dec. en gastejo „Schwarzes Rössel“ sian ĉi-jaran Zamenhof- kaj Kristnask-feston kaj samtempe festos la 50-jaran jubileon. — S-ano Fötinger gvidas bone frekventitan kurso por jun-instruistoj. F. Scheierl, sekr.

Wien. E.-Soc. Danubio. 13. 12. Zamenhof-Memor-Kunsido. 20. 12. Diskutvespero, 27. 12. Bonhumora Antaŭ-Silvestra Societ-kunveno.

Wien, Esperanto-Klubo.

La 14. de novembro ni festis la 5-jaran jubileon de nia klubo, kiu nun nombras pli ol 90 membroj.

Nia prezidanto kaj fondinto de la klubo kortega konsilanto Hugo Steiner skizis la vivon de la jubileanta klubo kaj prez. de AEA registara kons. Stengel, nia klubmembro, gratulis nome de AEA al sia plej granda infano, kies „patro“ li estas, kaj petis „la patrinon“ de la klubo, nian prezidanton, ke li plue zorgu tiel varme por sia infano.

Ne longe ankoraŭ vivas la klubo kompare al aliaj asocioj, sed, kio ĝin speciale distingas estas, ke dum la tuta tempo de ĝia ekzisto ne okazis eĉ unu debato pri organizaj demandoj, ne okazis eĉ unu malagrablaĵo en la vicoj de la klubanoj, sed ĉiam la mulnombra kunvenintaro vere Zamenhofe agis: „ili estis kaj restos rondo familia“. Ni ĉiam ĝojas, kiam nia mardo, nia klubvespero alproksimiĝas. Hojtasch, sekr.

21. dec. Kristnaskofesto. Ĉiu klubano kunprenu unu aŭ du malgrandajn pakajojn kun donaceto (libro, bakaĵoj ktp.). Tiuj inter niaj membroj, kiuj ne povas kunporti ion pro financaj aferoj, ne **estu ĝenataj pro tio. Ili venu, nenion kunportu** sed kompreneble en nia familia rondo ili same ricevos koran donaceton kiel la aliaj. Kelkaj samideanoj jam zorgos pri tio, alportante kelkajn pakaĵetojn. **Neniu manku** la 21. dec., kiam nin unuigos la Kristnaska Paco sub la lumanta Abio.

La 28. dec. ne okazos kunveno, sed la 4. de januaro ni ree kun freŝa ĝojo estos en niaj variaj kaj amuzoriĉaj kunvenoj ĉiun mardon je la 18 h 30 ĝis 21 h 30 en nia ejo: I., Wallnerstraße 6 (en la enirhalo dekstre).

Propaganda ekskurso! Pasintan printempon mi faris kun kolego perbiciklan veturadon post apero de anonco en 3 gazetoj. Alflugis kelkaj respondoj, sed ni ne povis ĉiujn viziti. Sur niaj bicikloj flugetis la verdstela flago, kiu atentigis sed ankaŭ mirigis multajn homojn, kiuj demandis pri ties signifo. Eĉ policisto estis sciema. Ni vizitis inter aliaj samideanojn en Graz, Graden ĉe Köflach kaj Klagenfurt, kiuj nin tre afable akceptis. Ni daŭrigis nian bicikladon al Lienz kaj trans Großglockner al Salzburg. Ankoraŭ nun ni tre ĝojas pri la precize 1000 km longa vojo, kiun faris niaj verdaj steloj!

Alois Hochreiner, teologo, Pastroseminario, Linz.



Nia junularo marŝas antaŭen!

Viglan movadon oni rimarkas inter la J. E. L. gejunuloj en Linz. Ĉiu membro de tiuj gejunuloj diligente lernas la esperantan lingvon, preskaŭ ĉiutage ili kunvenas pro ekzercado — sed ankaŭ la esperantismon. La dimancoj kaj festotagoj estas eluzataj de ili per ekskursoj aŭ promenadoj en la ĉirkaŭaĵon de nia urbo. La variado de la pejzaĵo ofte kunhelpas al riĉiĝo de esp. vorttrezoro.

Sed ankaŭ la tuta organizo bone funkcias kaj estas gojige rigardi la gejunulojn. Ĉiu unuopulo obeas al grupgvidanto aŭ al argvidanto kaj neesperantistoj ofte jam montris grandan intereson por tiu ekzemplodonanta grupo.

La junularo en Linz ĝis nun vere bone progresis kaj baldaŭ, eble jam en la venonta gazetnumero ni povas pri nova sukceso sciigi la legantaron.

Kunlaboru ĉiu senescepte en nia juna movado. Josef Kugler.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer“, Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28